

Wilhelm Heinrich Trompeter, laŭ Adolf Holzhaus  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 550, 1974.04.24 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiu tralegis historion de Esperanto, tiu estis altirita de la mistera personeco de Wilhelm Heinrich Trompeter, la fama mecenato, kiu dum tri jaroj prenis sur sin la tutan financan ŝarĝon de la unua esperanto-gazeto *La Esperantisto* kaj eĉ donis salajron al ĝia redaktoro Ludoviko Zamenhof. Oni sciis, ke tiu malavarulo ne estis riĉa, sed pri lia vivo oni restis sen scioj.

A.- Adolf Holzhaus en ĵus aperinta libro titolita *Wilhelm Heinrich Trompeter* publikigas interesajn kaj ĝis hodiaŭ nekonatajn tekstojn, kiuj pruvas, ke la savinto de la naskiĝanta esperanto-movado estis memfarita homo laboristdevena.

Cl.- Jen ni legos al vi la komencon de aŭtobiografio, kiun Trompeter verkis por sin prezenti al la reĝa mineja oficejo, kiam li estis 35-jaraĝa. Ĝi montras, en kiaj situacioj estis forĝita la personeco de tiu pioniro de Esperanto.

A.- « *En Heyde apud Rellinghausen, subdistrikto Essen, kie miaj gepatroj, ministro Wilhelm Trompeter kaj Agnes, naskita Dornemann, vivis sur malgranda propraĵo akirita per diligenteco kaj ŝparado, mi naskiĝis la 22-an de januaro 1839.*

Cl.- *De la 6-a ĝis la 14-a vivojaro mi vizitis la katolikan elementan lernejon en Rellinghausen kaj mi havis la bonŝancon tie trovi absolute kapablan kaj fervoran ĉefinstruiston Melchers, kiu donis al mi bonan fundamenton de elementaj scioj.*

A.- *Al minista profesio jam frue mi havis tiel bonan inklinon, ke kelkfoje mi jam kiel lernanto akompanis mian patron al lia nokta deĵoro. La 16-an de aŭgusto 1852 mi eklaboris kiel transport-tiristo en la minejo Kunstwerk kaj komencis per miaj malgrandaj salajroj iomete helpadi al mia gepatroj, kiuj krom mi devis prizorgi ankoraŭ ses pli junajn infanojn.*

Cl.- *La 1-an de februaro 1853 mi forlasis minejon Kunstwerk por fini la elementan lernejon, de kiu mi estis liberigita dum naŭ monatoj. Tiu ĉi aferstato efikis avantaĝe sur mia estonteco tiel, ke kiam mi trovis, kiel multe oni povas jam forgesi dum naŭ monatoj, nun firme mi ekintencis resti en seninterrompa interrilato ĉe la scienco.*

A.- *En majo 1853 mi laboris en la minejo Königin Elisabeth kaj en aŭtuno de la sama jaro en la minejo Graf Beust. En la lasta minejo mi estis okupita ankoraŭ dum unu jaro por laboroj sur la tero kaj poste sub la tero, kie ĝis aŭtuno 1858 mi plenumis kun aliaj ĉiujn tie okazantajn laborojn. En la minejo Graf Beust tamen mankis al mi la okazo studi profundigon de ŝakto, pro tio mi transiris al minejo Deinelsberg apud Steele. Tie ĉi mi estis okupita pri la profundigo de ŝakto, instalado de pumpiloj kaj starigo de maŝinoj.*

Cl.- *Krom tiu ĉi mia praktika okupo mi ankaŭ klopodis profundigi miajn elementajn sciojn. Unue por tio mi povis uzi nur dimanĉojn, ĉar tutan tempon, kiu restadis post laboro en la minejo, mi bezonis por helpi al miaj gepatroj en iliaj laboroj. La nun mortinta termezuristo Schweninger en Essen tiam havis dimanĉan lernejon por desegno- kaj kalkulo-instruado. Tiun ĉi lernejon mi vizitis de 1853 ĝis 1855. Tiam en Essen ministlerneja instruisto Dro Rauch*

*fondis preparan ministan lernejon kun 6 ĉiusemajnaj lecionoj por matematiko, kiun mi partoprenis dum unu jaro.*

*A.- Kiam en septembro 1856 estis anoncita nova kurso de minista lernejo en Essen, mi plenumis akcepto-ekzamenon kaj mi tiel sukcesis esti en la aĝo de 18 jaroj minista lernanto. La instruado okazis dum la unuaj tri tagoj de la semajno, la ceteraj tagoj restis por minista laboro, ellaboro de referatoj kaj solvo de lernejoj taskoj. Mia situacio estis iomete malfacila. Mi estis devigita zorgi por pli ol mia vivteno, mi devis iri ĉiutage de Rellinghausen unu horon ĝis la lernejo, respektive ĝis la laborloko, sed mi estis talentita per lern-fervoro, kaj tiel mi estis rekonata kiel unu el la plej progresanta lernanto. Mi havis emon al scienco, ne pensante pri tio, al kiu praktika rezultato ĝi povus servi por mi. [...]*

*Cl.- En la malbona ekonomia jaro 1865 mi ne trovis postenon de minista oficisto, tial mi denove prenis ministan kvarangulan martelon kaj laboris en la fer-minejo Neuessen II apud Rellinghausen. » (Fino de la citado.)*

A.- Vi eble foje finlegos tiun emociigan aŭtobiografian raporton de Trompeter. Ni hodiaŭ konkludos nian radioprelegon dirante, ke por la neesperanta publiko mecenato kiel tiu ministdevena geometro ne estis tre impresiga. Kutime mecenado estas plezuro rezervita al altrangaj riĉuloj. Sed ni devas konstati, ke ĝis hodiaŭ tiuj riĉuloj ne ankoraŭ rimarkis, ke esperanto ekzistas. Laboristoj kiel Trompeter estis tiurilate malpli miopaj. Ni neniam forgesu tion.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!